ISSN 2072-5825

# Espero Katolika



Numero 1-3-2020

Januaro-Marto 2020

JARKOLEKTO 117 - N. 1182-1184 - Januaro/Marto 2020

**Sur la kovrilo:** La papo Francisko alportanta Jesueton en la betleheman kripeton en la Baziliko de Sankta Petro en Vatikano.

## ENHAVO

LA PAPO FRANCISKO EN TAJLANDO INTER LA KATOLIKOJ KAJ BUDHANOJ (papo Francisko) 3

LA PAPO FRANCISKO EN JAPANIO (papo Francisko) 4

EKUMENAJ BIBLIAJ TAGOJ 2019 en Majenco (Mainz), Germanio 6

LA 33-A UECI-KONGRESO EN BRESCIA Centro Mater Divinae Gratiae 7

KONSIDEROJ PRI DISIĜOJ KAJ PACIĜOJ 10

TIU, KIU NEGADAS EKZISTON DE DIABLO, TIU NE KOMPRENAS TRANSCENDON DE DIO 13

SAĜAJ VORTOJ POR GEAMIKOJ 14

LA AMO DE DIO ESTAS ĈIAM FIDELA 15

VI, MIA LUMO 15

LA EVANGELIO – NASKO DE LA ĜOJO 16

**Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio**

**Elektronika poŝto:** <ikue@ikue.org>
**TTT-paĝoj:** http://www.ikue.org - http://www.esperokatolika.org * **Dissendolisto:** <ikue@yahoogroups.com>
**UEA-konto "ikue-v" * Banko:** "Unione internazionale cattolica esperantista" Roma, Italio
IBAN IT34H0760103200000023290000 - BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

*Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo* - Registrazione presso il Tribunale di Roma
n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

*Presejo* - Tipografia
ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

*Respondeca Direktoro* - Direttore responsabile
Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00010 GUIDONIA RM, Italio
tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

**Espero Katolika**, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de **I.K.U.E.**
**INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA** internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Spirita Konsilanto:** frato Pierluigi Svaldi - **Prezidantino:** Marija Belošević - **Vic-Prezidanto:** Miloslav Šváček - **Vic-Prezidanto:** Pavol Petrík - **Ĝenerala Sekretario/ Kasisto, direktoro de la C.O.:** Carlo Sarandrea - **Kontorevizoroj:** Norma Cescotti Covelli,Tiziana Fossati, Krzysztof Tomczak.

# LA PAPO FRANCISKO EN TAJLANDO INTER LA KATOLIKOJ KAJ BUDHANOJ

***La papo Francisko antaŭ la vojaĝo en Japanion vizitis tajlandajn kredantojn, kiuj en preskaŭ sepdekmiliona lando formas minoritaton. La vizito okazis en la spirito de la interreligia dialogo.***

En Tajlando vivas nur iom pli ol 300 mil katolikoj, kio estas eĉ ne duonprocento de la tuta populacio. „Mi deziras persone firmigi ĉiujn klopodojn de la malgranda, sed viva katolika komunumo en konservado kaj efektivigado de la specifaj proprecoj de la tajlandanoj, evokitajn pere de via ŝtathimno, kiel estas pacamo kaj simpatio," diris la Sankta Patro instigante la kristanojn fronti „ĉiujn ignorojn de la krioj de multaj niaj gefratoj, kiuj sopiras liberiĝi el jugo de malriĉeco, perforto kaj maljusteco". Kaj li aldiris: „Tiu ĉi lando portas nomon »libereco«. Tio eblas nur tiam, se oni kapablas senti respondecon de unuj por la aliaj kaj superadi ĉiun ajn formon de neegaleco."

La Sankta Patro ankaŭ renkontiĝis kun reprezentantoj de budhismo, kiu en Tajlando formas majoritaton (proksimume 96 % de enloĝantoj), kaj li ilin nomis „popolo de rideto". „Inter la kredantoj de diversaj konfesioj ni povas klopodi sukcesigi disvolvon de la novaj celadoj de la mizerikorda amo, esti kapablaj kreadi kaj realigadi iniciativojn de la frateco – precipe rilate al tiuj plej malriĉaj kaj koncerne al nia tiel turmentata komuna domo," diris la papo en budhana templo.

La papo renkontiĝis ankaŭ kun la plej supra budhista patriarko. „Se ni havas okazon ekkoni nin kaj havi al ni spite de niaj diferencoj reciprokan estimon, ni proponas al la mondo vorton de la espero kapabla esperigi kaj subteni tiujn, kiuj ĉiam pli multe suferas pro dispartigo. La okazoj kiel estas tiu ĉi hodiaŭa al ni memorigas, kiel estas grave, ke la religiaj konfesioj estu ankoraŭ pli multe lumturo de la espero, kiu akceptigas kaj garantias fratecon," diris la Sankta Patro



*La papo Francisko alvojaĝis la 20-an de novembro 2019 al la ĉefurbo de Tajlando Bangkok*



*La sankta meso la 21-an de novembro 2019 en la ĉefurbo de Tajlando Bangkok*

kun tio, ke inter la komunumoj devas firmiĝi ne nur estimo, sed ankaŭ amikeco. La tiea ĉefepiskopo Louis Chamniern Santisukniran dum la vizito nomis la papon „ponto inter la religioj“.

### La tajlanda martiro

En la dua kaj samtempe la lasta tago direktiĝis paŝoj de la papo Francisko kromalie al sanktejo, kiu memorigas naskiĝlokon de la tajlanda martiro Nicholas Bunkerd Kitbamrung, kiun en la jaro 2000 beatproklamis la papo Johano Paŭlo la Dua. Tiu ĉi sacerdoto en la tempo antaŭ la dua mondmilito defendis rajtojn de la kristanoj, pro kio li sub preteksto de spionado por malamika Francio post la militeksplodo estis malliberigita. Eĉ en malliberejo li heroldis evangelion kaj multajn kunprizonulojn li baptis. Li mortis pro tuberkulozo en la jaro 1944. ■

(vaticannews)

## LA PAPO FRANCISKO EN JAPANIO

***La papo Francisko kiel nur la dua plej alta reprezentanto de la katolika eklezio vizitis Japanion. Li memorigis tiamajn martirojn kaj rediris, ke la uzado de nukleaj armiloj estas malmorala.***

Moto de la vizito de la papo Francisko en Japanio estas „Gardi ĉiun vivon“. Tiuj ĉi vortoj estis gravaj precipe dimanĉe en Hiroŝimo kaj Nagasako, kie la papo sin kritike esprimis pri la nuklea armado. Li ankaŭ citis la vortojn de la papo Paŭlo la Sesa pri tio, ke ne estas eble ami kun armilo en la mano. Ĝuste por Japanio estas uzo de la nuklea energio por batalo konstante nesanigita vundo.

La papo jam komence de la oktobro diris al japanaj pilgrimantoj en Vatikano, ke uzo de la nuklea energio por militado estas malmorala. Tion li ripetis en Hiroŝimo kaj aldiris, ke malmorala estas eĉ „nur“ posedo de tiuj armiloj. „Humile mi deziras esti voĉo de tiuj, kies voĉo ne estas elaŭdita kaj kiuj kun maltrankviliĝo kaj angoro rigardas al kreskanta tensio penetriĝanta nian tempon, al neakceptebla malegaleco kaj maljusteco



*La papo Francisko en Hiroŝimo*

minacantaj la homan kunvivadon, al grava malkapablo zorgi pri nia komuna domo, al senĉesa kaj spasmeca armado, kvazaŭ la armiloj povus garantii la pacan estonton,“ diris la papo rekte ĉe la Paca Memoriga Monumento en Hiroŝimo, kie fine de la dua mondmilito eksplodis la atombombo. La Sankta Patro stariĝas longtempe kontraŭ la nuklea armado.

La papo Francisko dimanĉe la 24-an de novembro vizitis ankaŭ lokon, kiu memorigas duan eksplodon en Nagasako. Dum alparolo li esprimis siajn dubojn pri internacia sistemo, kiu devas la posedon de la armiloj de la amasa neniigado uzadi por monda ekvilibro kaj paco. „La paco kaj stabileco inter la nacioj estas neakordigebla kun kiu ajn strebado konstrui sur timego antaŭ reciproka neniigado aŭ sur minaco de la totala ekstermo,“ diris la papo. Li memorigis ankaŭ la vortojn de Johano la 23-a el enciklikо Pacem in terris, eldonitan meze de varmegaj krizoj de la malvarma milito, sed validanta eĉ hodiaŭ, ke la pacon kaj stabilecon alportos nur la reciproka konfido.

„En konvinko, ke la mondo sen nukleaj armiloj estas realigebla kaj necesega, mi postulas la politikajn reprezentantojn, por ke ili ne forgesu, ke nin tiuj ĉi armiloj ne defendas kontraŭ minacoj de la nacia kaj internacia sekureco de nia tempo. Estas necese pripensi apokalipsan sekvon de ilia uzo el vidpunkto humanitara kaj ekologia kaj rezigni pri la fortigado de la klima timego, malkonfido kaj malamikeco, parazitantaj per nukleaj doktrinoj,“ alvokis la papo mondpolitikistojn.

La Sankta Patro ankaŭ renkontiĝis kun homoj, kiuj transvivis trioblan katastrofon en la jaro 2011 – la tertremon, cunamon kaj averion de la atomenergia elektrejo en Fukuŝima. Kune li poste ankaŭ preĝis kun instruistino en la vartolernejo kaj kun budhista monaĥo. „La vojo al la definitiva sanigo povas esti konstante longa, sed eblas ĝin ĉiam regi, se oni kalkulas pri spirito de homoj kapablaj reciproke al si helpadi,“ diris laŭ Vatican News la papo dum renkontiĝo.

Historio plena de martireco

La papo ankaŭ memorigis referencon de la kristanaj martiroj, kiuj estis en la 17-a jarcento en la lando persekutataj kaj mortigataj. „La savon kaj certecon kuraĝe per siaj vivoj atestis sankta Paŭlo Miki kaj liaj kunuloj kaj ankaŭ miloj da martiroj, kiuj al vi postlasis sian spiritan referencon. Ni volas postsekvi ilin,“ diris la papo en la dimanĉa liturgio. Al la menciitaj martiroj li omaĝis ĉe la monumento memoriganta ilian oferon. ■

*Karel Pučelík, Katolika semajngazeto n-ro 48*



*Antaŭ la komenco de la sankta meso sur stadiono en Nagasaki*

# EKUMENAJ BIBLIAJ TAGOJ 2019
## en Majenco (Mainz), Germanio

De la 27-a de februaro ĝis la 3-a de marto 2019 okazis en Majenco, ĉe la Junulargastejo, la ĉiujara 4-taga renkontiĝo pri la Biblio. Partoprenis 23 esperantistoj el kelkaj eŭropaj nacioj: la plejmulto el Germanio, du el Belgio, du el Slovakio, unu el Nederlando kaj tri el Italio.

Ĵaŭde matene la 28-an de februaro komenciĝis la renkontiĝo; je la sepa kaj duono okazis preĝo de la Rozario (por la katolikoj); sekvis la matenmanĝo, la matena komuna preĝo kaj la kantorondo.

Tiuj ĉi agadoj ripetiĝis ĉiumatene je la sama horo. De la deka horo ĝis tagmezo la lute-rana pastoro Rohlof Wolfram, la organizanto de la religia programo, klarigis la „Libron de juĝistoj“, 11-an ĉapitron, proponante al ni, interalie, komunan ludon. Li invitis kelkajn el ni, kiuj pretis, rolaranĝi eventon, kiu jam okazis al ili, aŭ kiun oni povus imagi, laŭ tri temoj: puno, rekompenco, pardono.

La propono, akceptata de kelkaj, vekis grandan intereson ĉe ĉiuj kaj ĝi estis tre ŝatata. Posttagmeze okazis la ekskurso al la urbocentro de Majenco, la vizito al la malnova katedralo, al la muzeo “Museum fur Antike Schiffart” pri la antikva ŝipveturado, al la preĝejo de la aŭgustenanoj kaj al la dioceza muzeo.


Post la vespermanĝo kaj vespera preĝado okazis la Cigongo ekzercado, gvidata de ĉinino Nan Matthias - Wang.

Vendrede, la unuan de marto, post la kutima matena agado, je la deka horo okazis prelego pri la biblia temo – la klarigo de „Admono de Salomono.“ Pastoro Wolfram proponis pluan ludaktivadon. Li invitis ĉiun el ni respondi skribe kaj silente al lia demando: „Ĉu vi ŝatas la agadon de viaj ŝtataj regantoj aŭ reĝoj?“. Ankaŭ tiukaze ĉiu ĉeestanto skribis unu-du-trifoje siajn juĝojn, kritikojn, proponojn kaj preĝojn pri siaj regantoj.

Posttagmeze okazis ekskurso al Majenco, vizito de la muzeo Landesmuseum kaj la preĝejo de sankta Petro, vizito kun gvidisto al la romia sanktejo de Isis kaj al la Granda Patrino.

Post vespermanĝo okazis la asembleo de la germana sekcio de KELI kaj por la nepartoprenantoj komuna babilado en trinkejo.

Sabaton, la 2-an de marto je la deka okazis legado el la Biblio el la Evangelio laŭ Marko kaj el la Letero de sankta Paŭlo al la Romanoj, en kiu oni konsilas preĝi por la politikistoj. Posttagmeze okazis trajne ekskurso al Wiesbaden kun la vizito al la urba



*Katedralo de la sanktaj Marteno kaj Stefano en Majenco*




*La muzeo “Museum fur Antike Schiffart” pri la antikva ŝipveturado*

muzeo, al la „kochbrunnen“ (varmakva puto), al la urba „Kazino“ kaj promenado al la urbocentro.

Post la reveno kaj la vespermanĝo okazis la ekumena Diservo, post kiu sekvis la kutima babilado en la trinkejo.

Dimanĉe, la 3-an de marto, je la deka okazis la ekumena diservo en urba preĝejo.


Post la tagmanĝo, interŝanĝo de salutoj, brakumoj, kisoj, la reeĥoj de „ĝisrevido venontjare!“.

Fine... la partoprenintoj unu post la alia ekveturis por rehejmeniĝi. ■

*Norma Cescotti Covelli, Katolika Sento 4/2019*

## La 33-a UECI-kongreso en Brescia
### Centro Mater Divinae Gratiae – 10/13 de septembro 2019

***Pri la 33-a kongreso de UECI - la itala sekcio de IKUE jam raportis en Espero Katolika 10-12/2019 la prezidantino de IKUE fratino Marija Belošević; ĉi tie ni publikigas, kion pri ĝi raportis la revuo de UECI Katolika Sento 4/2019.***




Nia ĉi-jara kongreso okazis en Brescia ĉe la centro Mater Divinae Gratiae ekde la 10-a de septembro vespere ĝis la tagmezo de la 13-a de septembro. La temo de la kongreso estis: „La lokoj de la sankta Paŭlo la Sesa”.

Mardon vespere la kongresanoj kunvenis por komenci la diskutadon pri la gravaj problemoj, kiujn oni devos alfronti post la subita forpaso de la prezidanto G. Daminelli.

Merkredon matene okazis la kutima jarkunveno de UECI. La nova prezidantino, Tiziana Fossati, legis sian mesaĝon, per kiu ŝi listigis la sennombrajn problemojn, kiujn la asocio alfrontis kaj devos alfronti estonte por daŭrigi sian ekziston.

Posttagmeze la kongresanoj iris al la centro de Brescia por viziti la arkeologian



*Brescia – Capitolium (fotis Svaldi)*




*Brescia - Statuo de Paŭlo la 6-a en la nova katedralo (fotis Gazzola)*

lokon, kiu situas sub Palazzo Martinengo kaj la preĝejon de "S-ta Maria della Carità", kie oni povas admiri la fidelan reproduktaĵon de la sankta Domo de Nazareto, kies originalo estas konservita en la sanktejo de la sankta Domo en Loreto. Je la 17-a horo celebris Meson patro P. L. Svaldi kaj patro N. Marcuzzi en la sanktejo "Santa Maria delle Grazie", kie sankta Paŭlo la 6-a celebris sian unuan meson. Tie estas konservita relikvo apartenanta al la Papo. Temas pri trikotaĵo surmetita de la Papo dum lia paŝtista vizito al Filipinoj en la jaro 1970. Ĝi estas makuligita per lia sango kaŭze de atenco de li suferita fare de duonfrenezulo.

Laŭ la konsilo de nia gvidisto Alessandro Corrado, filo de la forpasinta kaj priplorata Glauco, ni vizitis la preĝejon de la sankta Francisko, kiu enhavas freskojn, rilatajn la skolon de Giotto.

Merkredon vespere dum vespermanĝo ni gastigis la prezidanton de la loka Esperanto-grupo L. Fraccaroli kaj la sekretariinon D. Bracchi, kiuj alportis la saluton de IFEF.

Ankaŭ la tuta familio Corrado vespermanĝis kun ni. Post la vespermanĝo ni kunvenis por aŭskulti la prelegon de nia asocianino Chiara Franchitti el Isernia, kiu parolis pri la libro verkita de Don Rinaldi, paroĥestro en Venafro. Don Rinaldi estis mesoservanto de la Papo kaj povis vidi lin deproksime.

Ĵaŭdon matene ni vizitis la novan Katedralon, kie situas la monumento de la Papo Paŭlo la 6-a – verko de skulptisto Scorzelli, kaj la malnovan katedralon, unu el la pli belaj ekzemploj de romanika arĥitekturo. Posttagmeze ni iris al Concesio, la naskiĝloko de la sankta Paŭlo la 6-a por viziti la kolekton de moderna sankta arto, kiu enhavas preskaŭ 7000 verkojn donacitajn al la Papo kaj devenantajn de la heredaĵo de lia sekretario Macchi.

La gvidistino klarigis la plej signifajn verkojn kaj parolis pri la amo de Paŭlo la 6-a por la arto. Poste ni vizitis lian naskiĝlokon, gvidataj de la fratulino prizorganta la hejmon.

Vespere alparolis nin la IKUE-prezidantino Marija Belošević, kiu estis nia gasto dum la tuta kongreso. En sia parolado ŝi informis nin pri la situacio de la asocio kaj plendis pri la malabunda partopreno de la asocianoj



*Brescia – Grupo de la kongresanoj en placo de sankta Paŭlo la 6-a (fotis Franchitti)*

en la iniciatoj, kiujn ŝi proponis precipe pri la kolektiva preĝado. Ŝi ankaŭ esprimis sian opinion pri la nuna situacio de ekumenismo, ĉefe evidentigante la diversecon de opinioj ekzistantaj inter katolikoj kaj protestantoj.

Vendredon matene, post la meso, la centra komitato denove kunvenis por pridiskuti pluajn problemojn koncernantaj ĉefe la eldonadon de la revuo kaj la estontan destinon de biblioteko „Glauco Corrado“, nuntempe konservata en la domo de Gianni Conti en Cormano.



**Alparolo de la UECI-prezidantino**

Apartajn dankojn al Alessandro Corrado, kiu akompanis nin tra la urbo, al nia ĉiama ŝoforo Felice kaj al L. Fraccaroli, kiu esperantigis la historiajn kaj turismajn informojn pri Brescia. Ni malfermas ĉi tiun kongreson kun la memoro pri nia prezidanto G. Daminelli. Lia granda laboro permesis la ekziston de UECI, malgraŭ la malfacilaĵoj kaj la disvastigo de la valoroj, je kiuj ni kredas. Lia tro rapida malapero profunde dolorigis nin kiel anojn kaj amikojn.

Mi decidis anstataŭi Daminelli-n pro respekto al lia sindonemo dum lia asocia administrado kaj pro mia sento de amikeco kaj estimo al li.

Ĉi tiu kongreso estos decida por la estonta ekzisto de UECI kaj kun bedaŭro mi konstatas la malpliiĝon de asocianoj.

Mi ne kaŝas la malfacilaĵojn renkontitajn de mi kaj de aliaj amikoj dum la lastaj monatoj, kiujn ni devos alfronti estonte: blokadon de la poŝta konto, presadon de la revuo, malkreskon de la membronombro ktp...

Mi ne faris liston de la multaj organizaj problemoj, kiuj premas UECI, ĉar ĝi estus iom longa. Tamen necesas konstati, ke la asocio ne povas esti administrata nur de unu persono, kiel okazis dum ĉi-lastaj jaroj. Tio perturbis la transdonon de la taskoj, malgraŭ, ke ĉiuj dokumentoj estas en ordo. Alia grava problemo estas la eldonado de la revuo.

Post la forpaso de Daminelli ni eldonis nur du numerojn dank' al la helpo de Norma Cescotti Covelli, kiu tradukis plejmulton el la artikoloj kaj Francesco Fagnani, kiu helpis per la kontrollego de la tekstoj.

UECI ne povas sin senigi je sia revuo, ĉar ĝi estas la sola kontakto kun la anoj, dislokitaj en la tuta Italio kaj pro tio malhelpataj renkontiĝi.

Krome, nuntempe, ĉiuj asocioj alfrontas reorganizadon, al kiu devigas freŝdataj leĝoj, kiuj ĉefe komplikas la administran parton.

Bedaŭrinde estas jam okazanta kultura ŝanĝiĝo, kiu malpliigas la gravecon de la asociiĝo.

La generacio, kiu sin engaĝis, por ke la asociismo alportu moralajn, spiritajn kaj kulturajn avantaĝojn al la socio, jam maljuniĝis kaj malsukcesis transdoni ĉi tiujn idealojn al la nova generacio.

Eble oni ne sukcesis ekkapti la novajn manierojn de la asociiĝo, kiuj okazas per la tiel nomataj sociaj retejoj.

Ni daŭre kredas je la partopreno kaj la renkontiĝo, kiuj estigas amikecon kaj kunlaboron. Ni fide atendu helpon de niaj patronaj sanktuloj kaj la sankta Paŭlo la Sesa, al kiu la kongreso estas dediĉita. Ili prilumu kaj gvidu nin ankaŭ en niaj estontaj elektoj. ■


*Tiziana Fossati*

*(El Katolika Sento 4/2019)*

# KONSIDEROJ PRI DISIĜOJ KAJ PACIĜOJ

**Prelego de frato Stefan Lepping, tiama komitatano de IKUE, prezentita en la 20-a Ekumena Esperanto-Kongreso en Trento-Cadine la 22-an de aŭgusto 2014**

***Malgraŭ tio, ke post la prelego de frato Stefan Lepping, prezentita en la 20-a EEK okazinta en Trento-Cadine, Italio, jam pasis kelkaj jaroj, ni publikigas ĝin nun, ĉar la de li prezentita temo estas eĉ nuntempe plu aktuala.***



*Preleganta frato Stefan Lepping el Germanio, tiama estrarano de IKUE*

Karaj gesamideanoj !

Jesuo Kristo preĝis antaŭ sia morto: "Patro, mi petas, ke ĉiuj estu unu, por ke la mondo kredu, ke Vi Min sendis." Ekzistas Unu Dio, Li estas Unu en tri „personoj", Unu en la Amo. Li mem estas la Amo. Kaj la Triunua Dio deziras, ke ni, homoj, antaŭ ĉio, ni kristanoj, estu Unu, kvankam apartaj personoj, unu en la Amo, unu en Li. La ĉefa ordono de Dio al la homo estas: "Vi amu Dion per tuta koro kaj per tuta animo kaj per tuta povo – kaj vian proksimulon kiel vin mem." Se tiu ordono estus plenumata, ekzistus neniuj disiĝoj, sed ĉiuj estus unu – kun Dio kaj unu kun la aliaj. Tamen, pro la envio de la diablo, de la komenco tiu unueco kaj amo estas perturbata: Kaj inter Dio kaj homo, kaj inter la homoj, kaj eĉ – kaj tio estas la plej granda skandalo – inter la homoj, kiuj asertas esti unu kun Dio!

Parolante pri la disiĝoj inter la kristanoj, specife inter la konfesioj, mi volas unue rigardi al kelkaj okazaĵoj de Malnova Testamento, sub tiu vidpunkto de disiĝoj kaj paciĝoj. Dio, kaj lia deziro por la homo, kaj lia vorto kaj ordono, ja estas eternaj, senŝanĝaj, eĉ se ili estas rivelataj nur en certa momento de la historio. El la ekzemploj de la Malnova Testamento, oni laŭ mi povas multe lerni eĉ por la hodiaŭa situacio; la historio de la Malnova Testamento estas antaŭbildo de la tempo, en kiu ni vivas.

Dio estas Patro – Filo – Sankta Spirito: tri en unueco, en amo. Li komence kreis la homon laŭ sia bildo, kiel viron kaj virinon: Du en unueco, en amo, kiuj rezultigas infanon, aŭ multajn infanojn, kiuj vivu laŭ la Dia plano en unueco kaj amo kun la gepatroj, kaj kun siaj gefratoj, ĝis ili mem forlasos patron kaj patrinon, ligos sin al alia junulo aŭ junulino (de la kontraŭa sekso), mem naskos idojn kaj fariĝos nova familio, tamen sen perdi la aman kaj respektan interligon kun la maljunaj gepatroj, geavoj. Sed la peko ĉiam detruas la Dian planon, jen pli, jen malpli. Jam en la unua generacio, Kain mortigis Habelon, pro envio: Li sentis lin amata de Dio, kaj sin mem li sentis neakceptata. Kvankam Dio avertis lin, li plenumis la pekegon de murdo de la senkulpa frato. Estas interese, ke la konflikto havas sian radikon en la ĝusta maniero, kiel honori Dion kaj oferi al Li...! Tamen la historio daŭris, eĉ Kain ne estis komplete kondamnita, nur punita fare de Dio, pro la pezo de la okazinta peko.

La homa familio ne vivadis laŭ la plano de Dio, do Dio faris novan komencon per Noa kaj lia familio. En Noa Li faris novan interligon kun la tuta homaro post li, kies signo estu la ĉielarko: ke Dio neniam plu pereigos ĉiun karnon. Malgraŭ tio, ankaŭ en tiu kazo okazis iom post ioma degenero, tiel ke Dio faris novan komencon kun Abraham, kiun Li aparte benis, ĉar li estis aparte devota al Li. Li promesis fari el li novan grandan popolon, kiun Li benados kaj per kiu

Li pludonos benon al ĉiuj popoloj. Sed ĉar Abraham ricevis eĉ ne unu filon, li decidis ekhavi idon de sia sklavino Hagar, Iŝmael. Sed Dio promesis ankoraŭ laŭkarnan idon de lia vera edzino Sara, Isaak, kaj Dio benis aparte tiun idon de la promeso, kvankam Iŝmael estis la unuenaskita. Ekestis kvereloj en la familio, kaj finfine Dio permesis al Abraham forsendi Hagar kun Iŝmael, promesante ke ankaŭ ilin Li benos en la dezerto.

La du filoj de Isaak, Jakob kaj Esav, ankaŭ batalis por la gloro esti la elektita kaj la plej amata. Sed Jakob, kvankam denove la duenaskita, per ruzo havigis al si la patran benon. Tio denove kaŭzis envion kaj batalojn ene de la elektita familio. Inter la 12 filoj de Jakobo, unu filo, Jozef, estis elstara, kaj plej amata kaj preferata de la patro, kio denove kaŭzis envion, eĉ la provon pro envio mortigi lin, finfine oni „nur" forkaptigis lin al Egiptujo. Tian ŝajne senkaŭzan envion, reziston, jes malamon, oni konstatas ankaŭ hodiaŭ kelkfoje kontraŭ spiritaj homoj, kaj ankaŭ kontraŭ la eklezio mem, kie ĝi estas fidela al la Spirito de Dio.

Sed kelkajn ĉapitrojn kaj multajn jarojn poste, ni vidas unu el la plej kortuŝaj okazaĵoj de eksplicita repaciĝo en la Biblio: Jozef, fariĝinta potenca en Egiptujo, pardonas kaj savas siajn fratojn, kiuj antaŭe ĝismorte malamis lin, kaj en larmoj ili forviŝis pardonante la vundojn kaj kulpojn el la pasinteco: La elektita familio, kerno de la evoluonta popolo Israel, retrovis sian unuecon – pro grandanimeco.

400 jarojn poste, dum la marŝado tra la dezerto, okazis pluraj ribeloj kontraŭ la unueco de la popolo. Tiu unueco ĝis tiam estis garantiita en la persono de Moseo, kiun Dio elektis por gvidi la popolon. Iufoje Aaron kaj Mirjam, aliafoje Koraĥ, Datan kaj Abiram asertis, ke ili estas same dotitaj, ke la tuta popolo ja estas elektita kaj dotita per la Sankta Spirito. Dio punis ilin publike kaj evidente kaj tiel restarigis la unuecon de la popolo. El tiu historio ni vidas, ke ankaŭ malrespekto de legitimaj gvidantoj povas kaŭzi disiĝojn. Tio estas konsiderinda ankaŭ por la historio de kristanaj disiĝoj.

Iam pli poste Dio starigis la reĝecon en Israel. La unua Reĝo, elektita de Dio kaj sanktoleita de Samuel, estis Saŭl. Kiam post certa tempo li forte pekis per malobeemo al la vorto de Dio, David estis sanktoleita kiel lia posteŭlo, dum li ankoraŭ reĝis. En tiu kunteksto estas interesege, ke la justeco de David konsistas ankaŭ en tio, ke li ĝis la fino de ties vivo komplete respektas la elektitecon de Saŭl, kaj konsideras ĝin kiel sankta, netuŝebla, eĉ malgraŭ tio, ke Saŭl volas murdi lin, kaj eĉ kvankam en milito David iumomente ekhavas bonegan ŝancon mortigi lin! Do, ne David kaŭzas la skismon ene de Israelo; estas nur la malamo de Saŭl kaj lia militado kontraŭ David, kiu estus tute nenecesa. Tio povas signifi por ni, kristanoj, ke povas esti bone kaj juste, elteni ankaŭ malbonajn gvidistojn de eklezio, kaj simple atendi ĝis ilia tempo finiĝos, anstataŭ ol kaŭzi skismon. Estas ja Dio mem, kiu gvidas suverene sian popolon kiel ŝafaron; la homaj oficuloj, eĉ se ili estas malbonaj aŭ malperfektaj, ja malhelpas, sed ne povas detrui la agadon de Dio. Male, respekti ilin, eĉ se ili estus malbonaj laŭ nia juĝo, povas gardi la unuecon de la popolo. Fari, el nia propra konscienco, la bonon kaj juston, tion neniu povas malpermesi al ni. Estas interese, ke ne malmultaj el la postaj sanktuloj de la katolika eklezio estis dum iuj tempoj de sia vivo forte atakataj kaj kontraŭbatalataj de ekleziaj instancoj mem! Mi persone dirus, ke eĉ parto de la t.n. herezuloj, kiuj dum la historio estis batalataj kaj kelkfoje murdataj fare de eklezioj, (cetere tute ne nur fare de la katolika eklezio...!) envere donis sian vivon por Jesuo kaj por la kristana popolo... Malperfektaĵoj kaj eventualaj eraroj ja ne nuligas la bonan volon kaj sinceran koron antaŭ Dio. Kiam finfine post la sinmortigo de Saŭl, la Davida dinastio stariĝis, tamen ankaŭ en la reĝa familio estis grandaj pekoj kaj problemoj, inkluzive de seksuma misuzado kaj murdo. Sed eĉ la modela reĝo David mem falis en grandan seksuman kaj mortigan pekon; tamen Dio pardonis, kaj ne rompis sian interligon kun David – pro ties sincera pento kaj sinhumiligo. La filo de David kaj Batseba, Salomono, estis komence ege benata, sed en la fino de lia vivo ankaŭ li

falis en la pekon de idol-adorado, tentita fare de siaj paganaj edzinoj... Idol-adorado estis unu el la plej signifaj pekoj en Israel, ĉar ĝi plej evidente rompis la interligon inter la elektita Israel kaj Dio kiel lia ununura Dio. Sed Dio anoncis sendi la punon nur sub la reĝeco de la filo de Salomono, Rehabeam. Sub li la dekdu triboj de Israel forlasis la fidelecon al la davida dinastio, kaj ankaŭ la legitiman tradician diservon en Jerusalem. En tiu skismo oni vidas, ke Dio ja staras sur la flanko de Rehabeam; ankaŭ en aliaj disiĝoj, oni kutime vidas en la Biblio, ke Dio ne estas senpartia! Tamen ĉi-foje ĝi vidas ankaŭ iun parton de la kulpo ĉe Rehabeam, ĉar li decidas tro severe reĝi sian popolon, kio kaŭzis la ribelon. En moderna ekumenismo, ni ne havas la kutimon rigardi la aferon partiece, kvazaŭ nur ĉefe la unu flanko estus prava – aŭ, eventuale, ni pledas ĉefe por nia propra flanko... Tamen estas laŭ mi interesa kaj utila demando: Kion Dio pensas pri la skismo? Kiuj disecoj en la kristanaro povas esti legitimaj, kaj pro kiuj kialoj? Ĉu vere ne eblas havi sufiĉan liberecon kaj diversecon, ankaŭ de teologiaj opinioj kaj akcentoj, ene de pli granda unueco, kiu ebligus paroli al la ekstera mondo per unu voĉo? Kiel la unueco de la kristanaro povas fariĝi pli konkreta, pli videbla? Kiel oni povas re-iri al la punktoj, kiuj disigis nin? Mi pensas, ke en la kazo de la Komuna Deklaracio pri justiĝo antaŭ Dio, subskribita de luteranoj, metodistoj kaj katolikoj, tio jam sufiĉe bone sukcesis. Kiaj estas la konsekvencoj? Ĉu ni elĉerpis ilin?

Pro manko de tempo mi volas ankoraŭ priparoli nur unu teksteton el la nova tempo, kiam ekestis nova disiĝo en la popolo de Dio: La skismo inter judoj nekredantaj je Jesuo, kaj la pra-eklezio, kiu ja ankaŭ ĉefe konsistis el judoj. Per la mortigo de Jesuo tiu malaprobo de Jesuo fare de lia amata Popolo ja havis kulminon. Sed en kaj post Pentekosto, jam multaj judoj kaj aliaj konvertiĝas al la kredo je Jesuo kiel mesio, savanto, Di-homo. Tamen, la oficiala konsilantaro de la judoj, kiu ja certe ankaŭ antaŭe decidis mortigi lin, restas nekredema, nun ĝi provas repuŝi la junan entuziasman movadon, surprizite pro la stranga reviviĝo kaj spirita forteco. Kaj Gamaliel, unu konsilanto, ekstaras kaj diras: "Pripensu bone, kion vi faros kun ĉi tiuj: Se ilia movado estas de homoj, ĝi disperdiĝos post ia tempo. Sed se ĝi estas de Dio, vi ne kapablos subpremadi ĝin; male, vi eĉ estos taksataj kiel batalantoj kontraŭ Dio!" Estas do bonega kaj vera progreso, ke ni kristanoj, mi pensas, preskaŭ ĉiuj, lernis intertempe, ne persekuti aliajn kristanojn pro malsamaj opinioj ktp. Ni ja strebadu al unueco ankaŭ en kredo kaj opinioj, se eble; por kompleta eklezia unueco kaj komuna Eŭharistio ankoraŭ restas kelkaj solvendaj demandoj. Sed ni atentu, kiel faras ankaŭ Papo Francisko: Kie la Spirito de Dio estas viva? Kie kaj kiel Li agas kaj kondukas nin, kaj la aliajn? Kie oni sincere klopodas praktiki la Vorton de Dio, de Jesuo, kie kaj kiel Ĝi povas doni pli da fruktoj, kaj superi la putrecajn postsekvojn de nia peka naturo? Ene de la eklezio, sed eble eĉ trans ĝiaj limoj, ĉu en aliaj konfesioj, ĉu eĉ en homoj de bona volo, kiuj konsideras sin nekristanoj? Tiu Spirito de Dio estas nemortigebla, male: ĝi estas fleginda ene de homoj, ene de komunumoj, eklezioj, grupoj, eĉ se ili ankoraŭ ne volas esti en plena unueco kun ni. Ni kredu, ke la eklezio, popolo de Dio, pro Lia graco kaj promesoj neniam povas komplete perei, ke eĉ el trunko dehakita povas elkreski nova tigo, nova arbo. Ni, katolikoj, kredas, ke la t.n. Ofico de Sankta Petro, la Papeco, estas unu el la donacoj de Jesuo por lia kristanaro, por paŝti liajn ŝafojn; bedaŭrinde nuntempe nur katolikoj konservis ĝin. Sed eble ĝi povas kunhelpi, kun multaj aliaj fortoj kaj elementoj, (antaŭ ĉio la vera Vorto de Jesuo en la Biblio, kaj la Sankta Spirito mem) al finfina unuigo de la kristanaro, ĉu granda, ĉu malgranda, sed en unu ŝafaro. Estas skribite, ke antaŭ la reveno de Jesuo en gloro, Lia fianĉino, estos unu, kaj sen makuloj. Ĉu ĝi estos multnombra aŭ ne, tio ne estas grava. Sed ĝi estu unu, en amo kaj vero. Tion povos plenumi nur la Sankta Spirito, estos granda donaco de la Dia graco. Sed mi pensas, ke ĝi venos. Ni strebu, ankaŭ per ĉi tiu internacia kongreseto, iomete kontribui al la perfektiĝo de Lia popolo, laŭ Lia volo kaj helpo. Dio benos nin. ■

*Trento-Cadine, 22.08.2014*

# TIU, KIU NEGADAS EKZISTON DE DIABLO, TIU NE KOMPRENAS TRANSCENDON DE DIO

La papa universitato Regina Apostolorum kunlabore kun Grupo de la sociala-religieca esplorado kaj informado (GRIS) organizis jam la 14-an jarkurson pri ekzorcismo kaj preĝo por liberigo (6.-11.5.2019).

Tiu ĉi seminario anstataŭas instruon de demonologio kaj anĝelologio, kiu malaperis el teologiaj fakultatoj, kaj dum tempo de sia ekzistado ĝi pruviĝis esti la plej efikanta rimedo de la eklezio por pli profunda ekkono de tiuj ĉi instruoj kaj diversaj influoj de demoneca efikado en la mondo – de la antropologia kaj sociala, trans neŭrologia ĝis kriminologia kaj jura sinsekvoj. La novaĵo de la nunjara kurso estis „ekumena ronda tablo“, al kiu alsidiĝis reprezentantoj de diversaj kristanaj konfesioj. La ritualon de ekzorcismo (eĉ se en diversaj variantoj) praktikas la ortodoksa eklezio kaj ankaŭ diversaj protestantaj konfesioj.



Diference de la ĝenerala konvinko la sestagan studan seminarion partoprenis ne nur ekzorcistoj, sed diversvaria publiko de la katolikaj animzorgaj laborantoj kaj pluaj interesatoj, informas unu el organizantoj, la dominikana ekzorcisto, fr. François Dermine: „Unuavice ne temas pri kurso destinita por ekzorcistoj, eĉ se multaj el ili ĝin partoprenas. Kolektiĝas ĉi tie diversvaria publiko de la aŭskultantoj, kiu sopiras konatiĝi pri la temaro kunigita kun multaj superstiĉoj kaj mistero. Do antaŭ ĉio ĉeestas sacerdotoj, kiuj volas informiĝi pri la ofico de ekzorcisto aŭ kiuj sin preparas por ĝia praktikado je postulo de sia episkopo, plue instruistoj de religio, animzorgaj laborantoj, psikologoj kaj psikiatroj, juristoj, kaj eĉ membroj de sekurecaj organoj, ĉar temas ankaŭ pri satanismo. Tio do plenigas vakuon, kiu ekestis en la teologiaj fakultatoj post tio, kiam preskaŭ en ĉiuj estis forigitaj seminarioj de anĝelologio, demonologio kaj ekzorcismo. Tio okazis kulpe de certa racionala manovro en la universitata instruo kaj en la klopodo pri pli granda animzorga celado de la teologiaj kursoj. Tiukaŭze estis ĉesigita instruo de la tuta vico da temoj, opiniantaj esti duarangaj, kvankam tiaj ili fakte ne estas. Ekzemple la seminario de anĝelologio estas tute principa kiel el vidpunkto dogmatika, tiel ankaŭ morala kaj animzorga. Jesuo mem diris, ke la influo de la diablo ekzistas kaj estas ĉieĉeestanta, sen tio ke ni, kiel mi aldiras, kompreneble malantaŭ ĉio ne devas tuj serĉi diablon. Tamen mi opinias kiel tute necesa ion pri li ekscii...“

La instruofico de la eklezio – komprenata kiel universala instituto – ĉiam kaj konstante heroldis ekziston de la diablo kaj ĝian influon en la mondo. Sojle de la jarmilo estis eldonitaj en du elsonserioj aktualigitaj ceremonioj de ekzorcismo (1998, 2004) kaj la eklezio deziras, ke en ĉiu diocezo estu nomumita sacerdoto-ekzorcisto, daŭrigas la franca dominikano. Iuj membroj de la eklezio, inkluzive de tiuj, kiuj havas decidan influon pri formado de novaj generacioj, bedaŭrinde la efikadon de la malbona spirito subtaksas:

„Se malaperos konscio pri ekzistado de la diablo kaj lia influo, tiam ni plu eĉ ne sukcesos klare ekrigardi la Dian transcendon kaj mision de Jesuo Kristo. En la letero al Hebreoj kaj ankaŭ en la unua letero de Johano klare tekstas, ke Dia Filo venis por finigi efikadon de la diablo. Kaj tiun argumentadon eblas neniel misaŭdi...,“ diras rande de la roma kurso pri la ekzorcismo kaj preĝo fr. François Dermine. ■

*www.vaticannews.va/cs.html, 14.5.2019*

# SAĜAJ VORTOJ POR GEAMIKOJ

Iun tagon malgranda papilio komencis elŝeliĝi el la kokono. Sidiĝinta viro atente rigardis, kiel la papilio trapuŝas sian kapon tra malvasta fendeto.

Kiam la papilio kvazaŭ haltis, atinginte la ekstreman limon de sia eblo, ne havante plu la forton...

Tiam la viro decidis helpi al ĝi. Li prenis tondilon kaj distranĉis la kokonon. La papilio eliĝis jam senprobleme, sed ĝia korpo estis malforta kaj la flugiloj estis sulkiĝintaj.



La viro daŭrigis la observadon esperante, ke la flugiloj de la malforta papilio iumomente komencos dikiĝi kaj grandiĝi, permesante al la papilio forflugi kaj sperti la vivon.

La bonkora kaj helpema homo bedaŭrinde ne sciis, ke la luktado de la papilio kontraŭ la kokono estis stimulo por ĝiaj flugiloj, permesanta al ĝi forflugi ien nur tiam, kiam estos venkita la rezisto de la kokono.

Iafoje batalo estas tio, kio estas bezona por ni en la vivo. Se bona Dio permesus al ni iri dum la vivo sen iu ajn problemo, ni ankaŭ povus fariĝi feblaj (malfortaj).

Ni petis pri la forto... Dio donis al ni spitaĵojn de la sorto, por fari nin fortaj.

Ni petis pri saĝeco... Dio donis al ni problemojn por solvadi ilin ĉiutage.

Ni petis pri bonstato... Dio donis al ni cerbon kaj forton.

Ni petis pri kuraĝo... Dio donis al ni obstaklojn por konkeri tiujn.

Ni petis pri amo... Dio donis al ni homojn troviĝantajn en klopodoj, por ke ni helpu al ili.

Ni petis pri favoro... Dio donis al ni okazon, por ke ni utiligu nian taŭgecon.

Ni ricevis ne tion, kion ni deziris... Sed ni ricevis ĉion, kio estis por ni bezonata.

KAJ NUN... PRIPENSU ĈION!

ĈU VIA PROPRA VIVO KONTENTIGAS VIN?

Hodiaŭ ni havas pli altajn konstruaĵojn kaj pli larĝajn vojojn, sed malpli fortan kapablon kaj malpli vastajn horizontojn.

Ni pli multe elspezas, sed malpli multe ni ĝojas.

Ni havas pli grandajn domojn, sed malpli grandajn familiojn.

Ni havas pli multe da devoj, sed malpli multe da tempo.


Ni pli multe scias, sed malpli multe ni komprenas.

Ni havas pli multe da medikamentoj, sed nia sano konstante malpliboniĝas.

Ni pligrandigis tion, kion ni posedas, sed ni malgrandigis niajn valorojn.

Ni multe parolas, sed malmulte amas, tre ofte ni malamas.

Ni faris vojaĝon al la Luno kaj reen, sed estas al ni malfacile transiri la straton por konatiĝi kun niaj najbaroj.



*Buzz Aldrin sur la luno 20.7.1969*

Ni konkeras la kosmon, sed malfacile estas por ni atingi la propran internon.

Ni havas pli grandajn salajrojn, sed mal-

pli grandajn moralajn valorojn.

Ni vivas en la tempo de nia pli granda libereco, sed ankaŭ de malpli granda agrableco.

Ni havas multe da nutraĵo, sed kun malmultaj nutroriĉaj valoroj.

Ni vivas en la tempo, kiam oni bezonas du salajrojn por vivteni la familion, sed la nombro de divorcoj konstante kreskas.

Ni vivas en la tempo de belaj domoj, sed... multaj hejmoj estas detruataj.

Pro tio mi proponas, ekde hodiaŭ:

Tenu nenion por eksterordinara okazo, ĉar ĉiu tago estas tiu eksterordinara okazo.

Strebu pri scioj, legu pli multe, sidiĝu antaŭ la domo kaj admiru la vidaĵojn sen pensi pri viaj propraj bezonoj.

Pasigu pli multe da tempo kun la familio kaj geamikoj, manĝu la preferatajn manĝaĵojn, vizitu la lokojn, kiujn vi ŝatas.

La vivo estas ĉeno de agrablaj momentoj, ne nur la batalo por travivi.

Uzadu kristalajn kalikojn. Ne tenu viajn plej bonajn parfumojn por pli bona okazo. Uzadu ilin, kiam vi ilin deziras.

Forigu el via vortprovizo tiajn esprimojn kiel: „iun tagon" aŭ „iam".

Skribu tiun leteron, kiun vi intencas „iam" skribi.

Diru al viaj familianoj kaj geamikoj, kiom multe vi amas ilin.

NENIAM PROKRASTU TION, KIO ALPORTAS RIDETON KAJ KONTENTON.

Ĉiu tago, ĉiu horo, ĉiu minuto estu por vi eksterordinara.

Se vi estos tro okupata por dividi vian ĝojon kun iu, kiun vi amas, nepre ne diru „mi konfesos tion al li aŭ ŝi iufoje", sed konsciu, ke „iafoje" povas neniam alveni. ■

## LA AMO DE DIO ESTAS ĈIAM FIDELA

Neniam permesu deigi vin de kaŭzo de via vivo, de la amo de via ĉiela Patro. Sen tiu amo malaperas starbazo sub viaj piedoj, sen ĝi vi estas orfoj, vi estas sen lumo kaj sen hejmo. Forte tenu la manon de la eterna, nedisigebla fidelo de Dio. Tiu bazo vin portas, ĉar la amo de Dio estas ĉiam fidela. En ĝia senlima graco kaj boneco vi restas kaŝitaj.

La patreca boneco de Dio estas tiel elstara, tiel potenca. Ĝi estas la plej profunda mizerikordo en arda unueco kun tenera, milda patrineco.

Kaj ambaŭ vin ĉirkaŭbrakas en senfina fideleco. Tiu fideleco donos al vi ankaŭ toleri justecon de la Patro.

Ĉar ankaŭ ĝi estas amo, neniam finanta amo pro fidela zorgemo de la patreca koro. Ĉiam ĝi estas por vi proksime kaj kondukas vin per saĝa kaj potenca mano returnen al si.

Kaj tio, kio ŝajnas esti puno, estas ja amo, la amo de via ĉiela Patro, kiu ne ĉesas vin serĉi, ankaŭ en la plej malhela malproksimo, por ĉiam vin voki hejmen en mildan, varman lumon de sia boneco kaj amo. ■

*Fratulino Franciskino Maria de la Krucumita Amo*
*(El libro „Abba – Kara Patro")*

## VI, MIA LUMO ...

**Por ke tiuj, kiuj rigardas min, ne vidu mian personon, sed Vin en mi, restu kun mi.**
**Tiel mi brilegos el Via brilego kaj povos esti lumo por la aliaj.**
**Mia lumo venos nur de Vi, Jesuo, estos mia eĉ ne unu malgranda radio.**
**Estos Vi tiu, kiu lumigos la aliajn pere de mi.**
**Inspiru al mi la laŭdon, kiun Vi plej ŝatas, prilumante la aliajn ĉirkaŭ mi.**
**Mi Vin anoncu ne per la vortoj, sed per la ekzemplo, per la atesto de miaj faroj, per la videbla elano de la amo, kiun mia koro ricevas de Vi. Amen.** *Patrino Tereza*

# LA EVANGELIO – NASKO DE LA ĜOJO

***„La spirito de la Eternulo estas sur mi, ĉar li min sanktoleis, por bonanonci al malriĉuloj.“*** Luk 4,18

La unua heroldo de la ĝojo de la evangelio estas anĝelo Gabrielo. Zeĥarjan li certigas, ke al li naskiĝos filo, kiu al li alportos *„ĝojon kaj feliĉon, kaj multaj ĝojos pro lia naskiĝo“* (Luk 1,14). Duonjaron pli poste eksonas la vortoj de la anĝelo: *„Ĝoju!“* tute silente, en kaŝiteco de hejmo de Maria. *„Dio decidis eniri historion pere de Vi!“*

Kaj tiel okazos: en Ŝi la ĝojo surmetas korpon. Pere de Ŝi la ĝojo enkorpiĝas. Ĝojo de Dio iĝas videbla, aŭdebla, palpebla. Ĝi estos kruele rifuzata, rigore atakata, sed same tiel freneze amata, arde admirata. Ĝojon oni ne povas reteni. Ĝi tuj ekiras, ekkuras sur galileaj montetoj kaj dancas sur judeaj altaĵoj. Estas tio ĝiaj unuaj paŝoj survoje, kiu neniam finiĝos, ili direktos tra ĉiuj vojoj de la mondo, en ĉiuj geografiaj larĝoj kaj longoj, transe de jarcentoj kaj jarmiloj. Neniu kaj nenio plu la ĝojon haltos sur ĝia vojo. Ni povas antaŭ ĝi brufermi pordon, malsuprenigi barieron, punekzili ĝin... vane, ĝi trairos aliloke. Ĝi trabatos al si vojon eĉ tra la plej profunda arbaro, tra la plej netrairebla dezerto, tra la plej ondanta maro. Kaj kial? Por ke ĝi atingu ĉiun koron soifantan pri la ĝojo.

Rigardu, kiel ĝojo ekloĝis en Elizabeto. El sino de juna Maria, kie la ĝojo estas kaŝita, ĝi trapenetros al etulo Johano, kiu ankaŭ estas kaŭriĝinta en la sino. Ĝi lin plenigos. Kaj li sin ekmoviĝos pro neesprimebla feliĉo. Li kvazaŭ farus dancpaŝon. Li ankoraŭ ne scias – sed lia patrino jes – ke Davido ankaŭ saltetadis antaŭ kesto de la interligo.

Ĝojon oni ne povas reteni, ne eblas ĝin ĵaluze gardi. Ĝi ne povas alie ol sin disdonadi, disverŝadi, same kiel lumo ne povas alie ol brili. Apenaŭ la ĝojo dancigas la etan Johanon Baptiston, sen forlasi lin, ĝi revenas al sia fonto: per alfluo de tiu ĉi ĝojo ekĝojegas frukto en la sino kaj elpruntas lipojn de sia patrino: „Mia spiri-to ĝojas en Dio!“ La magnifikaton mem Li pli poste elkantos per siaj vortoj: *„Mi Vin gloras, ho Patro, Estro de la ĉielo kaj la tero, ke Vi kaŝis ĉi tion for de saĝuloj kaj prudentuloj, kaj malkaŝis al infanetoj“* (Luk 10,21).

La etulo Johano ne kapablas alie respondi al vokado de sia Dio. Li ne povas paroli. Li povas danci. Li iĝos escepta profeto de la ĝojo. Li plenumos antaŭdiron, donitan fare de anĝelo al lia patro Zeĥarja. En la momento, kiam li retiriĝos en flankejon, li eldiros tiujn ravajn vortojn: ***„Mi ne estas Kristo, (...) sed la amiko de la fianĉo, kiu staras kaj lin aŭdas, tre ĝojas pro la voĉo de la fianĉo; ĉi tiu mia ĝojo do plenumiĝis“*** (Joh 3,28-29).

### Por enpensiĝo

Kiu staris ĉe naskiĝo de nia kredo, kiu estis nia unua heroldo de la ĝojo? Ni ĝoju kune kun Johano Baptisto pro voĉo de la fianĉo, pro voĉo de Jesuo, pro liaj vortoj kaŝitaj en la Sankta Skribo.

### Preĝo

Sinjoro Jesuo, mi dankas por tiuj, kiuj perigis al mi la ĝojan mesaĝon kaj alkondukis min al la kredo je Vi. Donu, ke mi ĉiam volonte aŭskultu vian voĉon kaj mi ĉiam agu laŭ ĝi. Amen. ■

Laŭ libro de Daniel Ange: La joie (Fonto de ĝojo)

Sed se ni iradas en la lumo, kiel Li estas en la lumo, ni havas kunulecon unu kun la alia, kaj la sango de Jesuo, Lia Filo, nin purigas de ĉia peko. 1 Joh 1,7